

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

25-a Jarkolekto * Decembro 2009 * N-ro 86

ISSN 1576 - 0618



HUERCAL OVERA

maŭra historio ĉe la andaluza oriento

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: Purificación JIMÉNEZ, Juan ARJONA LEYVA

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
15-a Andaluza Kongreso de Esperanto	5
Lingva Angulo	8
Historio pri unu el la heroinoj de la bahaa kredo:	
Martha Root	11
Seneko	13
La Kastelo Greziljono	17
Novelo: La Miraklo de la vino	19
Paĝoj pri nia Historio:	
Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio.....	22
Turismi en <i>HUERCAL OVERA</i>	26
Andaluza Kuirarto	29
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio	31
Libro-Servo de AEU	32
Internaciaj Esperanto-Asocioj	
Universala Medicina Esperanto-Asocio	33
Nekrologo	34
Flamenko	35

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



➤ SEVILO

Dum la monato junio Sevila Esperanto-Asocio ekfunkciigis sian novan TTT-paĝon, vizitebla ĉe <http://www.esperantosevilla.org>. Pere de ĝi, kaj pere de la lingvoj hispana kaj esperanta, la sevila asocio deziras diskonigi informojn pri kursoj, agadoj de la asocio, renkontiĝoj, ktp. Kompreneble reta kontakto kun ĝi eblas pere de la elektronika adreso: [info @ esperantosevilla. org](mailto:info@esperantosevilla.org)



A.S.E.

Sevila Esperanto Asocio

➤ MALAGO

Ángel ROBLES, kasisto de Malaga Esperanto-Asocio, informas pri sia projekto starigi en Malago monumenton omaĝe al Doktoro Zamenhof, kreinto de la lingvo Esperanto, aŭ al Esperanto mem, pri kies fina decido li dezirus ricevi opiniojn kaj konsilojn de geesperantistoj de la tuta Andaluzio. Krom lia profesia laboro kaj agado favore al la internacia lingvo, li ankaŭ realigas aliajn personajn projektojn, kiel la pentroarto. Antaŭ kelkaj jaroj la Urbestro de Malago komisiis al li la kreadon de monumento honore al la *Fabelrakontistoj*. Li kreis tiun monumenton pere de multkolora pentraĵo sur grandega ŝtono kiu staras ĉe granda placo sur la 3-a distrikto de la urbo Malago.

Ekde la jaro 1972-a ekzistas en Malago strato kun la nomo *Esperanto* kaj ankaŭ trapasejo *Esperanto*, kaj ĉe ambaŭ stratoj situas kelkaj komercaj entreprenoj kiuj ankaŭ nomiĝas *Esperanto*, ekzemple du kafejoj, fruktovendejo, juvelvendejo, kokridostejo kaj bestkuracejo.

Sur la venonta paĝo aperas fotografiaĵo kaj de la monumento al la *Fabelrakontistoj* kreita de nia malaga samideano kaj de la strato Esperanto.



Monumento en Malago al la
Fabelrakontisto



Strato kaj Kafejo Esperanto
en Malago

➤ ONUBO

Nia samideano Rafael MATEOS partoprenis pasintjare en la "Someraĵ Kursoj" en la Kastelo Grezilono (Francio). De la 4-a ĝis la 11-a de julio 2009 li gvidis la kurson *lerni Esperanton per ludoj kiuj kontribuas al la paco*, kaj de la 11-a ĝis la 18-a de julio la kurson *lerni Esperanton ludante*.



Kulturdomo de Esperanto
Château de Grésillon
FR-49150 Baugé, Francio

15a Andaluza Kongreso de Esperanto

La 15a Andaluza Kongreso de Esperanto okazos en Jaeno la tagojn 30an, 31an de oktobro kaj la 1an de novembro 2010. Temas pri longa semajnfino profitanta la ferian tagon de la 1a de novembro. La kongresejo estos la Junulara Gastejo de Jaeno, ĝi situas ĉe tipa antikva jaena kvartalo. Oni uzos la gastejon kiel tranoktejo, manĝejo kaj kunvenejo, tiel ni profitos eĉ la liberajn momentojn por praktiki la internacian lingvon.

Memoru, ke la andaluzaj kongresoj de esperanto ne estas fermitaj kunvenoj kun tute fiksitaj agadoj, tamen provizora programo inkludos ekspoziciojn, prelegojn, debatojn, teatraĵojn, projekciadon de filmoj en la internacia lingvo, kurson por komencantoj kaj ekskurson tra la urbo vizitante famajn lokojn.

Kvankam ne temas pri certigita programero Andaluza Esperanto-Unuiĝo planas prezenti novan eldonon de *"Cigana Romancaro"* ĉe la Domo-Muzeo de Federico García Lorca en Fuentevaqueros (Granado). Verŝajne nia asocio reeldonos la esperanto-tradukon de ĉi tiu Lorca verkaĵo, kiu Juan Regúlo publikigis en la jaro 1971 en sia eldonejo *Stafeto* kaj kiu nuntempe estas preskaŭ elĉerpita. Se ni sukcesas, oni organizos prezenton de la libro en la Muzeo de Federico García Lorca en Fuentevaqueros. Ĉi tiu vilaĝo distancas de Jaeno je proksimume 80 kilometroj, do la organizantoj de la kongreso faciligus la vojaĝon inter ambaŭ lokoj pere de aŭtobuso. Ĉi tiu akto povus okazi la sabaton 30an de oktobro.



La organizantoj de la Kongreso faciligas la restadon en Jaeno je tre favora prezo, kaj pro tio oni jam luis kelkajn ĉambrojn en la propra junulara restadejo, memoru, ke ne estas necese esti junaĝa por resti tie. Tiuj kiuj gastos ĉe la kongresejo mem rajtos ankaŭ mantenmanĝi kaj manĝi dum la tagoj de la Kongreso je tre favoraj prezoj. Ni petas al ĉiuj interesitoj partopreni en la Kongreso anonci sian ĉeeston al la organizantoj kaj tiel faciligi ilian laboron.

15a Andaluza Kongreso de Esperanto
Jaeno, 30a, 31a oktobro, 1a novembro 2010

ALIĜILO

Nomo kaj Familia Nomo: _____

Adreso: _____

Urbo _____ Poŝtkodo _____

Retadreso _____ @ _____ . _____

Telefono: _____ Fakso _____

Elektu Vian kotizon:

A) Baza kotizo : 20 €

B) Rabatoj:

- Aliĝo antaŭ la 31a de julio = - 10 €
 - Aliĝo ĝis la 30a de septembro = - 5 €
- Noto: La minimuma kotizo estis 10 €

Decidu ĉu Vi loĝos ĉe la kongresa restadejo

a) Tranoktado en dulita ĉambro la noktojn de la 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

b) Tagmanĝoj de la tagoj 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

Prezo entute = 60 €

aa) Tranokto en dulita ĉambro la nokton de la 30a (sabato)

bb) Matenmanĝo de la 31a (dimanĉo)

cc) Tagmanĝoj de la tagoj 30a kaj 31a (sabato kaj dimanĉo)

Prezo entute = 40 €

Kalkulu la kotizo-kvanton: kotizo + restado.

Pagu la kotizo-kvanton en la jena bankokonto: BBVA 0182 4106 71 0207160717
 pagoj el eksterlando : IBAN ES81 182 4106 7102 0716 0717 Swift Kodo:
 BBVAESMM

Noto: Nepre indiku en la pagilo *Kongreso Jaeno* kaj la nomon de la paginto.

Post la pago en la banko, resendu al ni ĉi tiun aliĝilon en la retadreso: andaluciaesperanto@gmail.com aŭ vi simple sendu mesaĝon sciigante pri via nomo, adreso, pagita kotizo kaj elektita restado.

humoro



Lingva Angulo

PLI - PLU - PLUS

Kiam en lingvo estas uzata la sama vorto en diversaj esprimoj, tio povas esti malfacilaĵo se ni devas uzi la tradukon de tiu vorto en alia lingvo, ĉar, por nia nacilingva influo, ni ne scios kie uzi ĝuste tiun vorton en tiu alia lingvo. Ekzemplo pri tio estas la uzo de la hispanlingva adverbo *más* kaj ĝiaj tri esperantlingvaj tradukoj "pli – plu – plus".

Ni parolu pri PLI. Ne temas ĉi-foje pri la komparativo "*pli...ol*", ekzemple: *mi estas pli alta ol vi* (yo soy más alto que tú), sed pri la substantivfunkcia kvantesprimo kun la signifo "pli multe". Ĉi tiel ni uzos "pli" kiam temas pri kvanto, sed ne pri tempo. Ekzemple: *Vi ne devas spezi pli* (No debes gastar más). Se post la adverbo *pli* ni deziras aperigi substantivon ni uzos "*pli da*". Ekzemple: *Mi ne povas trinki pli da biero* (No puedo beber más cerveza). *Ĉu vi deziras pli da supo?* (¿Desea más sopa?). Memoru ne uzi la akuzativan formon de la substantivo post "*pli da*".

Ni uzos PLU kiam la hispanlingva adverbo *más* rilatas al tempo-kvanto. *Plu* signas, ke ago aŭ stato ne ĉesis, sed daŭras en la aktuala aŭ en tiu momento. Ekzemple: *Restu iom plu* (Quédate un poco más). *Se vi volas aprobi la ekzamenon vi devos studi plu*. (Si deseas aprobar el examen deberás estudiar más). En ĉi lasta frazo okulfrapas ke, temas pri studi pli da tempo "*studi plu*", ne pri studi pli da aferoj aŭ pli intense "*studi pli*". En la hispana lingvo ĉi diferencon oni ne povas signi en izolita frazo, en esperanto jes.

En konkretaj frazoj oni povas uzi ambaŭ adverbojn (pli / plu), ĉar ne gravas diferenci la tempon aŭ la kvanton. Ekzemple: *Mi ne volas legi pli* (No quiero leer más), tio estas, mi ne volas legi pli da paĝoj aŭ legi pli da libroj. Same oni povas diri: *Mi ne volas legi plu* (No quiero leer más), en la senco, ke mi ne volas legi pli da tempo.

Memoru:

PLI → kvanto

PLU → tempo

Kaj kiam uzi PLUS ? Ni uzos PLUS, kiam temas pri aritmetikaj formuloj. Ekzemple $3 + 4 = 7$ Tri plus kvar faras sep. *Johano plus Karlo kapablos venki ĉiujn*. (Juan más Carlos serán capaces de vencer a todos). Ĉi-kaze oni povus anstataŭigi plus per "kaj": *Johano kaj Karlo...*

Uzado de PLI / PLU kiel adjektivo.-

PLIA, tio estas *pli* kun la adjektiva finaĵo, havas vicmontran signifon. Ekzemple: *Okazis al mi unu plia malagrablaĵo* (Me ha ocurrido una desgracia más). Tio estas, okazis al mi jam unu, du, tri, kvar... malagrablaĵoj, kaj nun okazas unu plia. Ankaŭ oni povas uzi *kroma*. *Donu al mi du kromajn botelojn*. (Deme dos botellas más).

PLUA, *plu* kun la a-finaĵo, rilatas al io daŭranta kaj okazanta en posta tempo, memoru la ĉiaman rilaton plu→tempo. *Mi tion konsentas, sed mi rifuzas ĉion pluan*. (Estoy de acuerdo con eso, pero rechazo todo lo demás -todo lo que sucedió después en el tiempo-).

Kelkaj interesaj ekzemploj.-

Se vi scius, kiu li estas, vi respektus lin pli
Si tú supieras quien es, le respetarías más.

Mi amas lin pli kaj pli.
Le amo más y más.

Mi scias pri tio pli malpli.
Yo sé de eso más o menos.

Mi amas ŝin ĉiutage pli.
La amo cada día más.

Provu unu plian fojon.
Inténtalo una vez más.

Ĉiufoje pli.
Cada vez más.

Li ne vivos pli ol unu tagon.
Él no vivirá más de un día.

Mi ne plilongigos lian suferon.
No alargaré su sufrimiento.

Silentu, ne parolu plu !
¡Silencio, no hables más!

La reĝo ne deziris pluigi la militon.
El rey no deseó continuar (extender más en el tiempo) la guerra.

ALIĜU AL *Andaluzia Esperanto-Unuiĝo*

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: aeu@esperantoandalucia.org
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jena sciigo apud Via nomo: *Kotizo 2010*.

Por kontakti kun la Esperanto-Movado en Andaluzio, bv. uzi jenajn elektronikajn adresojn:

- ✓ Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
[aeu @ esperantoandalucia.org](mailto:aeu@esperantoandalucia.org)
- ✓ Esperanto-Klubo Aksarkio (Vélez Malaga)
[axarquia @ esperantoandalucia.org](mailto:axarquia@esperantoandalucia.org)
- ✓ Jaena Esperanto-Asocio
[jaen @ esperantoandalucia.org](mailto:jaen@esperantoandalucia.org)
- ✓ Esperanto el Kadizo
[cadiz @ esperantoandalucia.org](mailto:cadiz@esperantoandalucia.org)
- ✓ Kordova Esperanto-Asocio
[cordoba @ esperantoandalucia.org](mailto:cordoba@esperantoandalucia.org)
- ✓ Malaga Esperanto-Asocio "Marbordo de la Suno"
[malaga @ esperantoandalucia.org](mailto:malaga@esperantoandalucia.org)
- ✓ Onuba Esperanto-Asocio
[huelva @ esperantoandalucia.org](mailto:huelva@esperantoandalucia.org)
- ✓ Asociación Sevillana de Esperanto
[info @ esperantosevilla.org](mailto:info@esperantosevilla.org)
- ✓ Bulteno "Monate ĉe Vi"
[angelarquillos @gmail.com](mailto:angelarquillos@gmail.com)
- ✓ Revuo "Gazeto Andaluzia"
[esperanto14 @ono.com](mailto:esperanto14@ono.com)

Historio pri unu el la heroinoj de la Bahaa Kredo: *MARTHA ROOT*



Purificación Jiménez

Se ni devus respondi la demandon kiu bahaana vojaĝanto-instruisto trairis plej vastan geografian spacon por diskonigi la Mesaĝon de Dio revelaciitan al Bahá'u'lláh en ĉi tiu epoko, la sola ebla respondo estas la mencio de ŝia nomo: Martha Root.

Kiam en la jaro 1915a unu el la plej gravaj dokumentoj pro sia enhavo "Tabeloj de la Dia Plano" estis diskonigata en Ameriko ŝi, Marta Root, ekstarigis tuj kun firma rezoluteco por plenumi la deziron de tiu, kiun ŝi konsideris la amato de ŝia koro, samkiel kiam venis Jesuo Kristo liaj adeptoj forlasis ĉion kaj ili sindediĉis prediki la Bonan Novaĵon.

Unu el ŝiaj plej grandaj sukcesoj en la alproksimiĝo de la Bahaa Kredo al afinaj organizoj estis ŝia daŭra kontakto kun esperantistoj. Por atingi tion ŝi strebadis, inter vojaĝoj, lerni tiun lingvon kies iama instruistino ŝia estis Lidia Zamenhof.

En la jaro 1925a per la helpo de iu amiko ŝi tradukis unuafoje pribahaan libron al Esperanto titolitan "Kio estas la Bahaa movado?", kaj poste la libron "Bahá'u'lláh kaj la Nova Epoko" ĉifoj kun la helpo de Lidia Zamenhof, kiu, kiel sciante, estis filino de la kreinto de Esperanto.

Ekde la jaro kiam okazis en Genevo (Svisio) la 17^a UK (Universala Kongreso de Esperanto) en 1925, kaj dum sinsekvaj jaroj Marta aranĝis siajn vojaĝojn tiamaniere ke ŝi ĉiam ĉeestis kaj aktive partoprenis en tiaj eventoj. Tiel inter la jaroj 1926a kaj 1934a ŝi partoprenis la UK-ojn en Edimburgo (Skotlando), Danzig -nun Gdansk-

(Pollando), Antverpeno (Belgio), Parizo (Francio), Kolonjo (Germanio), Stokholmo (Svedio) en kies plej parto ŝi brile prelegis pri la Bahaa Mesaĝo, kio kaptis la atenton de multnombraj homoj al ĉi tiu religio, nuntempe la dua plej disvastigita en la mondo.



Martha Root

Alia signifoplena afablaĵo pri ŝia personeco estas kiam ŝi eksciis pri la ideo planti arbon solenade pri la 25^a datreveno de la unua UK, ŝi petis saketon kun semoj de la Sanktaj Tomboj por esprimi sian sentan korinklinon al la lingvo, kiu laŭ la filo de la Bahaa-Kredo fondinto, ĝi povus esti konsiderata kiel la universala lingvo kiu iam estonte povus unuigi ĉiujn popolojn en la mondo.

Estante 60-jara kaj post la trifoje rondiro tutmonda Martha Root, je la granda surprizo de konatoj kaj nekonatoj, denove aranĝis la valizon kaj enŝipiĝis cele al Eŭropo.

La Mesaĝo de Bahá'u'lláh ne nur donis al ŝi kuraĝon por superi malfacilojn sed tio ankaŭ donacis al ŝi du orajn flugilojn por fendi oceanojn kaj transiri kontinentojn.

Spaco kaj tempo neniam ekzistis por ŝi ĉar ŝi portis sian Bonamaton en sia koro.

Notu la adreson de la nova blogo de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo



<http://www.andaluciaesperanto.blogspot.com/>

SENEKO

Lukius Anneus Seneko naskiĝis en la urbo Kordovo en la jaro 4-a a.K. Li naskiĝis ĉe riĉa familio, lia prapatraro apartenis al la socia klaso *equites*, tio estas la kavaliroj. Lia patro, Seneko la retorikulo, estis klera viro kiu translokiĝis, kune kun sia tuta familio, en Romon por havigi al siaj tri filoj pli altkvalita edukado. Oni scias malmulte pri lia vivo, tamen estas konataj kelkaj riproĉoj faritaj de aliaj filozofoj kontraŭ li. Oni akuzis lin esti komplico en diversaj murdoj plenumitaj dum la regadoj de la imperiestroj Klaŭdio kaj Nerono, inter ili tiuj de Mesalina, la propra imperiestro Klaŭdio, Agripina kaj Britaniko. Ankaŭ oni riproĉis al li lian riĉegan publikan vivon, tute kontraŭa al la stoikaj ideoj de li defenditaj. Al tio li lerte respondis, ke oni ne devas serĉi riĉaĵojn tamen ankaŭ ne oni devas rifuzi ilin.



Malgraŭ tiuj kritikoj kontraŭ sia privata vivo Seneko elstariĝis baldaŭ pro sia oratora kapablo. Li estis kvestoro (magistrato), filozofo, verkisto kaj politikisto dum la vivo de tri romiaj imperiestroj (Kaligulo, Klaŭdio kaj Nerono). Dum la regado de Kaligulo (de la 37-a ĝis la 41-a p.K.) oni diras, ke la imperiestro mem, envianta la oratoran kapablon de la filozofo, ordonis lian murdon, tamen iu konsilis la imperiestron ne plenumi tion, ĉar laŭdire li malsaniĝis pro ftizo kaj plejeble li baldaŭ forpasus, tamen li feliĉe resaniĝis.

Dum la epoko de Klaŭdio (de la 41-a ĝis la 54-a p.K.) Mesalina, la edzino de la imperiestro, petegis sendi en ekzilon la filozofon, sub la akuzo adulti kun Julia Livilla, fratino de Kaligulo. Seneko devis ekziliĝi en Korsikon dum ok jaroj, ĝis kiam Agripina, la patrino de la onta imperiestro Nerono kaj kvina edzino de Klaŭdio, alvenigis lin en Romon por agadi kiel instruisto de Nerono, tiam 11-jaraaĝa. Oni diras, ke Agripina helpis la kordovan filozofon antaŭenirigi sian publikan vivon kaj tiel, oni nomis lin pretoro kaj li eĉ eniris en la Senaton. Verdire Agripina agadis tiel, ĉar la prestiĝo de la instruisto ankaŭ

estis grava afero en la elekto de onta imperiestro kaj kompreneble Agripina deziris helpi sian filon Nerono.

Nerono estis imperiestro de Romio de la 54-a ĝis la 68-a jaro p.K. Apud li, Seneko kaj alia elstara senatano Burro regis la imperian politikon, Agripina, la patrino de la imperiestro favoris tiun nomumon. Seneko komprenis, ke iom post iom Agripina, ekhavanta problemojn kun sia propra filo Nerono, emis havigi al si la tutan povon de la impero favore al Britaniko, filo de la imperiestro Klaŭdio. Verŝajne Seneko ordonis la morton de Britaniko pere de fortega veneno kaj poste eĉ la morton de la propra Agripina kaj malaperigi ĉi tiel, la konstantajn intrigojn ĉe la imperia palaco.


Pro ĉi ĉiuj politikaj luktoj Nerono ĉesis Senekon, kiu dum la postaj tri jaroj dediĉis ekskluzive filozofii kaj verki. Tamen la imperiestro ne forgesis definitive sian antaŭan intruiston kaj post tiu tempo li ordonis al la kordova filozofo memmortigi. Kial? La historiistoj havas malsimilajn opiniojn pri la kaŭzo de tiu ordono. Oni diras, ke Seneko partoprenis en la komploto de Kalpurnjo Pison kontraŭ la imperiestro Nerono; aliaj opinias, ke tiu partopreno ne estas certa, tamen iu komdamnito akuzis la filozofon simpatii al tiu ribelo. Ne gravas la kaŭzo, tio kio ja okazis estis la morto de Seneko, oni diras, ke la filozofo, kiel stoikulo, skribis adiaŭan leteron, trinkis pokalon da cikuto kaj li fine tranĉis siajn vejnojn dum li banis en varma akvo.



La morto de Seneko laŭ klasika pentraĵo.

Seneko estas la aŭtoro de divers-tamaj verkaĵoj: tragedioj, satiroj, epistoloj kaj dialogoj, sed estis la filozofiaj temoj pri kio Seneko elstaris, kaj ene de la filozofio li estis ano de la stoika skolo, kiu proklamis, ke la celo de la vivo estas la atingo de la feliĉeco per la etiko, kaj tion oni atingas se la homo vivas akorde al la leĝoj de la naturo. El siaj verkoj elstaras "Pri la nedaŭreco de la vivo", en ĉi tiu libro Seneko volis montri, ke li preferis la vivon akorde kun la naturo kvankam li ne povis plenumi siajn dezirojn ĝis la lastaj jaroj de sia vivo kiam li forlasis ĉian politikan vivon. Ene de ĉi tiu verkaĵo estas leginda lia klarigo pri la vivo-tempo, tiel mallonga por ĉiuj kaj tiel longa por li mem.

En la verko "Pri la persisto de la saĝulo" Seneko diris, ke la saĝulo restas stabila kaj serena malgraŭ la misfortuno. Alia gravaj verkaĵoj estas "Pri la profitoj" kaj "Pri la indulgemo", Seneko verkis ilin kiam Nerono estis 18-jaraĝa, en ĉi tiuj libroj la filozofo rekomendas la imperiestron eviti kruelajn agadojn kaj la praktiki tiranian povon.



Esperant-lingva traduko de verko de Seneko, eldonita de Stafco en la jaro 1994 kaj tradukita el la latina lingvo de Gerrit Berveling.

Seneko, kiel stoika filozofo, parolis en siaj verkoj pri la frateco inter ĉiuj homoj, kvankam li, kiel riĉa romiano havis nombrajn sklavojn, li oponis al la sklaveco ĉar ĉiuj homoj estas egalaj. La mez-epokaj filozofoj, ĉefe Erasmo de Rotterdamo, akceptis kaj aktualigis multajn ideojn de ĉi tiu kordova filozofo kaj tiel, la Humanista Filozofia Skolo konsideris Senekon kiel antaŭulo.

Kompreneble kelkaj verkoj de Seneko aperis tradukitaj en esperanton. La elstara nederlanda aŭtoro Gerrit Berveling jam publikigis kelkajn verkojn de la kordova filozofo en nia lingvo. En la jaro 1990 oni eldonis *Apokolokintozo de l'Dia Klaŭdio*; en tiu sama jaro la eldonejo Voko publikigis la tradukon en esperanton fare de Berveling de *Konsolo al sia patrino Helvia*.

Unu el la plej konataj tradukoj de Berveling estas *Oktavia*, verkita ankaŭ de Seneko kaj eldonita en la jaro 1988 de Flandra Esperanto-Ligo kaj fine István Ertl tradukis en la jaro 1991 *Pri feliĉa vivado*. Fine Gerrit Berveling elektis sufiĉan reprezenton de la seneka verkaro en sia *Antologio Latina* Vol. 3.

Tamen jam en la jaro 1910-a profesoro de esperanto en Kordovo, S-ro Miguel Pérez Alcorta, publikigis jenajn pensaĵojn de la klera kordova filozofo tradukitaj en la tiama juna esperanto.

- *En la malbono nur povas esti unu bono; la honto esti ĝin farinta.*
- *Sufiĉus, kiel rimedo, esti pli bonaj ol la malbonaj.*
- *Ne estas tre granda la animo de tiu, al kiu plaĉas la teraj aferoj.*
- *Ni penu forgesi tion, kio alportita al la memoro malgajigas nin.*
- *Necesaj estas novaj favoroj de la sorto por konservi la feliĉon.*
- *Estas dolore, ke ni komencas la vivon, kiam ni mortas.*
- *Facile oni akiras tion, kio estas sufiĉa por vivi.*
- *La spertado estas necesa por scii ion ajn.*
- *La kuraĝo ambicias ĉiam la danĝerojn.*
- *Malgranda ilaro sufiĉas por bone vivi.*
- *Ĉiuj samopinias kontraŭ la malbonfarado.*
- *Neniu estas tiel humila, ke li ne havas povon por fari al iu malutilon.*
- *Virta pruvo estas, malplaĉi al la malbonuloj.*
- *Tro frue mortas la homo, por ke li povi koni la nemortebajn aferojn.*

LA KASTELO GRÉSILLON (*Greziljono*)

Disponi pri propra sidejo estas revo por la plejmulto el la esperantistaj asocioj. Pro la manko da ekonomiaj oficialaj apogoj, aĉeti aŭ lui domon aŭ alian konstruaĵon nur estas eble se oni kalkulas kun la apogo kaj sindonemo de la samideanaro, bedaŭrinde neniam tro riĉopova se paroli pri mono. Tamen, ja disponi pri sidejo, funkcia kiel renkontiĝejo kaj kiel loko el kie disvastigi kursojn kaj agadojn favore al la internacia lingvo, estas gravega por niaj asocioj, ĉar multfoje el tio dependas la daŭrigado de la asocioj kaj kluboj esperantaj.

En Hispanio ni devas elstari la sindonemon de kelkaj privatuloj, kiuj dum la 60-a jardeko de la pasinta jarcento aĉetis propramane, kaj poste donacis, al Hispana Esperanto-Federacio, urbocentran oficejon en Madrido. Tamen, eble la plej fama kaj granda sidejo de la E-movado en la tuta mondo estas la kastelo Grésillon en Francio. Temas pri la sidejo de la kooperativo "Kulturdomo de la Francaj Esperantistoj", kaj ne temas pri tipa oficejo meze de urbo, aŭ pri normala domo en vilaĝo, sed ja pri kastelo en unu el la plej belaj turismaj zonoj en Francio.



Kastelo Greziljono
en Francio

Fine de la jaro 1951, sub la impulso de S-ro MICARD, instruisto kaj fervora esperantisto, estis kreata la kooperativa societo "Kulturdomo de la Francaj Esperantistoj". La revata entrepreno de la kooperativo aspektis al multaj kiel tro granda, temis pri la aĉeto de domo en kiu, dum la ferioj, esperantistoj el la tuta mondo povu kunvivi kaj kunveni por sekvi kursojn, prelegojn kaj ankaŭ por distriĝi. La celo estis montri, je malgranda skalo, kiel povus esti mondo sen lingvaj baroj. Kiel dirite la revo aspektis tro granda, ĉefe pro la fakto, ke la iniciantoj ne povis kalkuli pri ekstera financa

helpado. Ili alvokis al la individuaj esperantistaj kaso, plej ofte tre modestaj. Tamen optimismo, konfido kaj sindonemo kondukis al sukceso kaj pro tio estis eble ne nur aĉeti domon, kiu estis la unua projekto, sed ja kastelon staranta meze de parko deksephektara je amplekso, ĉirkaŭ du kvadrataj kilometroj, kaj situanta en la franca regiono Anjou, en la departemento Maine-et Loire, regiono tre turisma.

La oficiala inaŭguro okazis en la jaro 1952, sed unue oni devis modernigi la internon kaj la eksteron de la konstruaĵo. Krom la loĝejo, la gastoj havis je sia dispono naĝejon, golfejon, retpilkan ludejojn, infanludejon, lageton, herbejon kaj arbareton, kie oni povis promeni kaj ripozi. Interne de la kastelo ili povis trovi salonojn, muzikejon kaj bibliotekon, kaj kompreneble multe da loko por la interbabilado. Nuntempe la kastelo disponas pri 22 ĉambroj kun entute 57 litoj kaj ankaŭ dormejo kun 10 matracoj, kaj se paroli pri tendumado, ekstere de la kastelo estas eble tendumi.

Dum ĝiaj pli ol 50 jaroj da historio, la kastelo Greziljono, kiel kulturdomo de la francaj esperantistoj, estis la sidejo de multnombraj konferencoj, prelegoj, kursoj kaj renkontiĝoj de geesperantistoj de la tuta mondo. Ekzemple, dum somero 2010 okazas kursoj kaj atelieroj, ĉefe unusemajnaj, pri tajĝiĉjŭano, libro-bindado, astronomio, matematiko, verkado de poezioj, ktp.



Gepartoprenantoj en seminario ĉe la kastelo

Antaŭ kelkaj jaroj, la franca administracio devigis la posedanton de la kastelo, tio estas la esperantista kooperativo, renovigi la instalaĵojn de la kastelo, ĉefe tiuj elektraj, pro la fakto, ke ĉe la kastelo renkontiĝis ofte kelkdekoj da personoj estis necese certigi la sekurecon de la gastoj. Tiu renovigo faris necesa la monan kontribuon de la francaj geesperantistoj. Sed ĉio jam solviĝis, la franca

administracio denove rajtigis la gastigadon ĉe la kastelo kaj nuntempe eĉ oni povas kuir ĉe la propra kastelo por ĉiuj gastoj. Ja, la ekzisto de kastelo ĉe turisma regiono estas bonega ekonomia rimedo por esperantista asocio, kiu povas atingi monon dank'al la vizitantoj kaj partoprenantoj en la kursoj, kaj tio ankaŭ estas bonega ŝanco por resti dum semajno ĉe vere internacia esperantista etoso.

NOVELO

La Miraklo de la Vino

Oni baptis min kiel ĉiujn aliajn bebojn; mi ricevis ĉe la preĝejo la unuan komunion plenĝoje, kiel miaj ceteraj kunuloj; je la tempo ricevi la konfirmacion mi dubis, tamen mi ne deziris ekigi konflikton ĉe mia familio, do fine, mi akceptis kaj, sen granda konvinkigo, mi deklaris kredi kaj obei. Tamen mi ne kapablis krei je ĉio proklamita, je tiuj mirakloj miksaĵo el magio kaj mistero mi ne kapablis kredi, la racio ja venkis. Mi ne povis kredi, ke oni detruis turon kiu pretendis tuŝi la ĉielon; ankaŭ ne, ke bastono fariĝis serpento pro la deziro de profeto; kaj kompreneble ankaŭ ne, ke la akvo iufoje fariĝis vino. Mi povis akcepti la ideon, ke Dio ekzistas, tamen ne, ke li estis magiisto.



Kaj, se la mirakloj ne ekzistas... kiel oni povas kompreni, ke mi trovis ŝin? -"Nur, hazardo"-, ŝi diris. "La destino", mi pensis, aŭ verŝajne estis tute vera tiu antikva teorio pri la reenkarigo. Se laŭ kelkaj opinioj la vivo estas labirinto, tio kio ja estis tute vera estis la fakto, ke ene de ĝi troviĝis kaŝita rekta linio, ne-videbla rekta linio kiu kondukis min al ŝi.

Verdire ne estis blinda renkonto kiam mi ekkonis ŝin persone. Mi nudis ŝin tiom da fojoj dum niaj konversacioj, ke verŝajne neniu konis ŝin pli bone ol mi. Mi ankaŭ konfesis al ŝi sentojn jam tute forgesitaj de mi. Pro tio, kiam ni kundecidiis renkontiĝi, ĝi temis pri la akuratigo de ĉio pri kio ni jam parolis antaŭe. Tamen ĝis tiam mi ne konis ŝin.

Kvankam poste ŝi aperis en miaj sonĝoj sur diversaj scenejoj mi agnoskas, ke kiam mi pensas je ŝi, mi ĉiam meoras tiun restoracion. Mi tute ne scias ĉu ĉirkaŭis nin pliaj personoj. Mi ne rimarkis pri tio. Mi ankaŭ ne memoras la manĝaĵojn, kvankam ne ĉion mi forgesis, mi memoras la glason da vino dum la nokto-manĝo. Mi ne vizitas ofte luksajn restoraciojn, do mi ne estas tute certa

pri kiu glaso oni devas uzi se temas pri vin-trinkado. Ŝi petis akvon al la kelnero kaj li verŝis ĝin el la ĝustan glason. Ni parolis dum la tuta nokto-manĝo kiel se ni ne konus antaŭe; ni parolis pri niaj vivoj, eble memori iin estus dolor por ni; ni parolis pri la estonteco, maleble ni povus ĝui ĝin kune. Ni parolis kaj ridis, ĉar tiu renkonto ne estis dramatika akto, ĝi okazis kaj kvankam temis nur pri du-hora renkonto, post tio mi povus aserti, ke mi jam konis ŝin.



Tiam ŝi diris:

- ĉu vi ne gustumas la vinon?

Mi dubis, mi ne sciis ĉu ridi aŭ ne, ĉar ene de la glaso nur akvo enestis. Ŝi oferis la glason al mi, kvazaŭ erotika objekto kaj mi trinkis. Ja temis pri akvo, el la plej freŝa fonto, sed akvo. Do, mi respondis al ŝia ŝerco dirante, ke verŝajne la vino estis baptita kiel mi dum mia infan-aĝo.

Ŝi diris denove:

- Ne, gustumu ĝin kaj vi rimarkos la saponon.

Tiam ŝi proksimigis la glason oferante al mi ĝuste la lokon kiun ŝi antaŭe markis per siaj lipoj. Mi trinkis la glason kaj mi sentis ke mi kisis ŝiajn lipojn. Mi fermis miajn okulojn kaj tio kio antaŭe estis nur akvo fariĝis la plej bona el la vinoj. Mi ektime malfermis ilin, ŝi ridetis.

- Kion vi opinias pri mia vino?, ŝi diris.

Mi ne kapablis respondi. Mi ridetis kaj surpriziĝis samtempe. La nokto-manĝo daŭris du horojn. Ni parolis pri ĉio kio ligis al ni kaj pri nia deziro esti kunaj por ĉiam, kaj parolante pri tio la vino kiun mi regustumis ŝajnis dolĉa; ni parolis pri niaj vivoj, pri la distanco ekzistanta inter ni, kaj tiam la vino gustumis kiel verda vino; ni parolis pri la estonteco, pri la malfacila eblo maljuniĝi kunaj, kaj tiam la vino en

la glaso gustumis kiel vino oldigita de la tempo; ni parolis fine pri la pasio kiu ĉirkaŭis nin dum nia renkonto, kaj la vino gustumis kiel la plej ŝaŭmanta el la ĉampanoj. Tamen, kiam mi malfermis miajn okulojn post ĉiu sorbo, ene de la glaso nur enestis akvo. Ŝi ridetis al mi kiam mi metis miajn lipojn sur la saman lokon kie estis sia buŝo antaŭe, plejeble tiu estis unu el la pliaj misteroj de tiu nokto.

Se vidata de ĉiuj, tie estis paro da personoj trinkante akvon, sed laŭ ni, post ĉiu kiso al la glaso, ni gustumis vinon, la plej bongusta vino farita speciale por ni kaj por ĉiu momento de ni vivita kune.

Nur estis du horoj, aliaj personoj atendis nin kaj pro tio, ni ne povis daŭrigi tiujn momentojn, malgraŭ tio estis nia deziro. Ekde tiam mi jam ne dubas, ke la amo kapablas fari proksimecon el la lontaneco; amon el amikeco; vinon el akvo kaj kison el du lipoj sur la sama glaso.



Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Pastro Jerónimo Córdoba

La plej valora havaĵo de la Esperanto-Movado estas la esperantistaro mem, ĉar nur tiuj kiuj decidis iufoje en sia vivo lerni la zamenhofan lingvon, kapablas antaŭenirigi esperanton pere de propagando, verkado aŭ konstanta praktikado. Sed kurioze, multfoje oni ne scias kiu parolis esperanton kaj tiel surprize, oni diras, ke tiu aŭ alia starulo parolis nian lingvon. Unu el ili, tre proksima al la kultura vivo de la andaluza urbo Sevilo estis Francisco Córdoba Roldán. Sed, kiu li estis? Nu, jen helpo por trovi respondon, ĉiuj sevilanoj de tempo al tempo pasas tra urbocentra placo nomigita dank'al ĉi elstara samideano: la Pastro Jerónimo Córdoba.

Jerónimo Córdoba, naskita Francisco Córdoba Roldán, naskiĝis en la toleda urbo Villacañas en al jaro 1863, li ne apartenis al riĉa familio, tamen li distingiĝis pro sia inteligento. En la jaro 1881 li eniris en la Piulan Lernejon de Alcalá de Henares (Madrid) kaj en la jaro 1881 li fariĝis frato de la religia ordeno de la Piulaj Lernejoj, li adoptis la nomon "Jerónimo de la Inmaculada Concepción".

Li baldaŭ elstariĝis kiel specialisto pri la latina lingvo, lingvo



Pastro Jerónimo Córdoba

Villacañas (Toledo) 1863
Sevilo 1933

kiun li tute regis. La religia ordeno al al kiu li apartenis sendis lin en la lernejon de la urbo Sevilo, nuntempe ne ekzistanta, tamen urbocentra strato ankoraŭ nomiĝas tiel *Calle de las Escuelas Pías* (Strato Piulaj Lernejoj), por memori la lokon kie ĝi situis. Ĉe tiu lernejo la Pastro Jerónimo instruis la latinan kaj la francan lingvojn. Verdire la pastro Jerónimo Córdoba estis specialisto pri lingvoj kaj dum tiuj jaroj juna pola kuracisto diskonigis en la mondon novan lingvon: esperanto.

La Pastro Jerónimo Córdoba baldaŭ distingiĝis kiel profesoro, kaj ne nur en la andaluzia urbo ĉar lia famo kiel latinisto etendiĝis tra la tuta Hispanio. Marcelino Menéndez Pelayo, konata hispana lingvisto, konsideris lin la plej grava latinisto en Hispanio tra la tuta historio.

Kiel latinisto li verkis plurajn poemojn kaj odojn en la klasika lingvo, kaj ne nur pri religiaj temoj. Li eĉ lanĉis la ideon traduki Don Kihoton en la latinan lingvon kaj por plenumi tiun taskon li invitis kulturajn akademiojn, latinistojn kaj pastrojn kunhelpi lin.

Li mem tradukis la unuajn 12 ĉapitrojn de tiu mondfama verkaĵo. Kiel omaĝo al Seviljo li plenumis la taskon traduki alian cervantesan libron *Rinconete y Cortadillo*. Kiel dirite li verkis en la latinan ne nur pri religiaj temoj, ĉi tiel omaĝe al la aviadistoj de la transatlantika flugo de la aviadilo Plus Ultra, kiu en la jaro 1923 vojaĝis de Andaluzio ĝis Bonaero (Respubliko Argentina), li verkis la poemon "Aerio Planum". Tra la 200 versoj de ĉi tiu poemo Jerónimo Córdoba menciis la grandajn inventojn de la Homaro, ĉefe teknikaj: la aviadilon, la aŭtomobilon, la telegrafo... kaj ankaŭ la internacian lingvon esperanton. Li skribis pri la zamenhova lingvo:

*Desunto et voces, queis nun exponere certe,
Deficiunt vires... fandi et portenta sophorum.
Plus Ultra! Maneat semper sub pectoris imo...
Nos semper sophiae recreent miracula verae,
Antiquoque novos artibus dent jungere mundos.
Quique Esperanto Zamenophi verba loquantur,
Extendant hujus clarum per saecula Nomen.*

Li mem tradukis en la hispanan:

*Faltan palabras, que narrar permitan,
Y fuerzas para hablar tantos portentos,
Invención de los sabios... Que el Plus Ultra!
Palabras de progreso, quede siempre
En el pecho grabado de los hombres.
Sigamos los prodigios sorprendentes
De la ciencia veraz, y nuevos mundos
Juntamos del saber al mundo antiguo,
Y llégense a expresar con el idioma
De Zamenoph, invento prodigioso
Que Esperanto se llama y que su nombre
Se extienda por doquier el hombre more.*

Famega estis ankaŭ lia priskribo de taŭroludo en la latina lingvo sub la titolo *Cursus Taurorum*.

Nu, kaj kio pri la esperantista agado de Jerónimo Córdoba? Kiel dirite la sevila pastro estis unu el la plej kleraj intelektuloj en la urbo Sevilo dum la unua triono de la pasinta jarcento. Kiel kapabla lingvisto li lernis la internacian lingvon kaj sedube li kontaktis kun la esperantistaro de la urbo. Dum tiuj jaroj la ĉefaj motoroj de la movado en Sevilo estis Trinidad Soriano, arkitekto kaj provinca deputito, Casto Vidal, kuracisto, kaj Rafael Fiol Paredes, militisto kaj kuracisto sed ne ĉiam loĝanta en la urbo kaj Carlos Martínez, oficisto ĉe fervoja kompanio. En la jaro 1920 mortis Trinidad Soriano, la prezidanto de la grupo kaj senlaca propagandanto de la lingvo en la andaluza urbo. La sevila grupo proponis tiam al la pastro Jerónimo Córdoba okupi la postenon de honora prezidanto. Tamen, malgraŭ tiu "honora posteno" li konstante agadis favore al la sevila esperantista asocio publike. Tiel li ofte inaŭguris la kursojn de la internacia lingvo organizataj en Sevilo ĉe la Ekonomia Societo aŭ malfermis ilin.

La pastro Jerónimo Córdoba forpasis en la jaro 1933. La sevila ĵurnalaro omaĝis lin elstarante lian intelektan kapabalecon. Dum la sekvantaj jaroj oni memoris lin ĉefe dank'al liaj lemantoj, inter ili Santiago Montoto kaj Enrique de Iniesta Coullat-Valera kaj Jose Maria Izquierdo, kiu publikigis kortuŝan artikolon ĉe revuo memorante la lecionojn de la instruista pastro.

Dum la 4-a jardeko aperis artikoloj sur diversaj sevilaj ĵurnaloj: *ABC* kaj *EL CORREO DE ANDALUCÍA*, pere de kiuj la aŭtoroj petis al la Sevila Urbodomo la nomigon de strato per la nomo de la pastro. Tio finfine okazis en la jaro 1943, kiam la urbodomo decidis nomumi placon apudan al la Piula Lernejo, kie li dum tiom da jaroj instruis, per la nomo *Plaza Jerónimo Córdoba* (Placo Jeronimo Cordoba).



Pastro Jerónimo Córdoba
de la religia ordeno de la
Piulaj Lernejoj

La lernejo jam ne ekzistas, la placo jes. Ĝuste sur antikva kaj tipa kvartalo de la urbo troviĝas tiu placo kiu memorigas al ni ĉiutage pri tiu pastro kiu regis la latinan lingvon kaj kiu konsideris esperanton kiel simbolo de frateco, paco kaj amo, laŭ siaj propraj vortoj. Sendube pro tio, li montris ĉiam sian esperantistecan, eĉ kun malgrandaj detaloj, ekzemple li ĉiam portis la verdan stelon sur la brusto,

kiam li instruis la latinan lingvon en sia lernejo, laŭ asertis Juan de Dios MONTOTO, andaluza esperantisto kaj esploranto pri la historio de nia lingvo en Andaluzio, okaze de prelego pri la esperantisteco de Blas Infante, farita okaze de la 8-a Andaluza Kongreso de Esperanto en Jerezo 1988. Kaj pri tio li ja posedis gravajn pruvojn, ĉar la avo mem de la historiisto estis lernanto de la Pastro Jerónimo de Córdoba.

J.M.R.H.



Placo Patro Jerónimo Córdoba en Seviljo

Turismi en ... HUERCAL OVERA

Oriente de Andaluzio, tuj apud la murcia regiono, troviĝas ĉe la Almeria provinco vilaĝo kiu laŭdire ja estas urbo kaj ĉefe, ponto inter popoloj kaj civilizacioj, temas pri Huercal Overa.

Ekzistas historiaj restaĵoj, apartenantaj al la Bronz-Epoko, pruvantaj, ke sur la sud-orienta zono de la Ibera Duoninsulo sidiĝis unu el la plej progresintaj socioj de tiu epoko en Eŭropo, temas pri la tiel nomata: *Kulturo de El Argar*, la nomon ĝi ricevas pro la loko kie troviĝis la plej abundaj restaĵoj. Nu, tiuj estis la unuaj enloĝantoj de la zono kie troviĝas Huercal Overa, jam dumil jaroj a.K.

La minaj riĉaĵoj altiris la atenton de multaj mediteraneaj popoloj, ĉi tie venis fenicoj, kartaganoj, romianoj..., iuj por komerci, aliaj por konkeri. Verŝajne, proksime de Huercal Overa troviĝis la urbo *Munda*, tie okazis en la jaro 214 a.K. granda batalo inter kartaganoj kaj romianoj. Venkis la kartaga Hasdrubalo kaj mortis la romia ĝeneralo Kneo Scipiono. Kompreneble ne temas pri tutcerta okazintaĵo, sed arkeologiaj restaĵoj trovitaj, ekzemple arĝentaj spronoj kaj sag-pintoj, pruvas, ke tiutempe okazis tie granda batalo inter du gravaj armeoj.

La romianoj dividis la Iberan Duoninsulon laŭ provincoj. La zono

kie nun situas Huercal Overa apartenis ne al la Betika provinco, kiel la cetera nuntempa Andaluzio, sed al la pli norda provinco Tarako. Do, la romianoj starigis tie militajn kampadejojn en ĉi tiu landlima regiono.



Blazono de
HUERCAL OVERA

En la jaro 711 la araboj eniras en la Iberan Duoninsulon. En la jaro 846 okazis longaj senpluvaj sezonoj kaj tio provokis la senpopoligon de tiu regiono de la islama Al-Andalus. Post kelkaj jaroj komenciĝis nova repopoligo kaj tiel fondiĝis du novaj setlejoj

Güercal kaj *Overa*, bazoj de la nuntempa vilaĝo. La reguligo de la apuda rivero *Almanzora* faciligis la vivon de la tiutempaj enloĝantoj.

En la jaro 1488 la vilaĝo estas konkerita de la armeo de la Katolikaj Gereĝoj kaj kristinaj familioj, alvenintaj el Kastilio, estis la novaj enloĝantoj de *Güercal*, la plejmulto el la enloĝantoj de *Overa* daŭre estus moriskoj. En la jaro 1569 okazis moriska ribelo kontraŭ la kastilia kristana povo. La malvenko de la moriskoj kaj la posta forpelo el ili provokis novan repopoligon de la ĝis tiam moriska *Overa*, kiu en la jaro 1572 definitive unuiĝis al *Güercal* sub la regado de la apuda murcia vilaĝo Lorca. En la jaro 1668 la unuigitaj *Güercal* kaj *Overa* sendependiĝis kaj aperis la nova vilaĝo Huerca Overa.

Dum la 17-a kaj 18-a jarcentoj Huerca Overa estis fruktdona tero kiel la terkulturado provizis siajn enloĝantojn, malgraŭ tio ankaŭ estis oftaj epidemioj, plagoj kaj eĉ tertremoj. Jam en la 19-a jarcento Huerca Overa estis bazo de la hispana armeo en ĝia lukto kontraŭ la napoleonaj soldatoj, kiuj finfine sukcesis okupi la vilaĝon. Post tiu milito Huerca Overa pligrandiĝis, kaj tiel la 2.000 enloĝantoj de la jaro 1805 fariĝis 3.000 en la jaro 1834 kaj 16.000 en 1887.

Dum la hispana civila milito de la jaro 1936 Huerca Overa estis limo inter ambaŭ armeoj, ankoraŭ videblas en la pejzaĝoj militaj tranĉeoj kie unu kaj alia flankoj kombatis. Post la milito la vilaĝo, kiel la cetera Andaluzio suferis fortan

elmigradon de multaj enloĝantoj, serĉantaj en aliaj hispanaj zonoj kaj eĉ fore de Hispanio, la labor-lokojn kaj salajrojn kiujn ili ne sukcesis trovi ĉe sia propra vilaĝo. Feliĉe dum la 7-a kaj 8-a jardeko de la pasinta jarcento Huerca Overa kaj la cetera Almeria provinco ĝuis ekonomian kaj socian prosperon, dank'al la antaŭenirigon de la terkulturado.

Monumentoj

* Preĝejo de La Asunción

Temas pri la plej granda preĝejo en Huerca Overa. Stile klasika, ĝia centra navo mezuras preskaŭ 40 metrojn longe kaj 10 larĝe. La cirkla volbo estas impona. La preĝejo havas antikvan orgenon konstruita en la jaro 1772.



* La Turo Ballabona

Ankaŭ konata kiel *La Turo*. Temas pri araba fortikaĵo konstruita por kontroli la vojon en Almerion. Ĝi stariĝas sur montento kaj oni povas

povas viziti ĝin senpage. Dum multaj jaroj ĝi utilis ankaŭ kiel optika turo por komuniki mesaĝojn longdistance.

* Kastelo de la Antikva Huerca.

Starigita sur la ruinoj de antikva romia fortikaĵo, la araboj konstruis ĉi tiun kastelon. Ĝi stariĝas sur la monto Almagro kaj dum la 12-a jarcento ĝi estis unu el la plej gravaj defendiloj de la zono.

* Urbodomo

Konstruita fine de la 19-a jarcento unuamomente ĉi tiu konstruaĵo utilis kiel Juĝejo kaj poste eĉ kiel malliberejo. Nuntempe ĝi estas la loka urbodomo.



Festoj

La 8-an de februaro okazas la festo de la fajro. En tiu tago de la jaro 1739, oni finkonstruis la Preĝejon kie nun estas de *La Asunción*. Tiam la enloĝantoj de la vilaĝo festis la enirigon de la Sanktaj Sakramentoj en la preĝejo ekbruligante fajrojn sur

la stratoj. De tiam estas kutimo ekbruligi fajrojn dum tiu sama nokto.

Dum la tria semajno de la monato oktobro okazas foiro, tipe andaluza. Ofte ĉeestas ne nur enloĝantoj de la vilaĝo sed ankaŭ de la ĉirkaŭaĵoj, ĉar dum multe da jaroj tiu foiro estis la plej grava renkontiĝo de la kamparanoj por vendi kaj aĉeti produktojn.

De la 24-a ĝis la 26-a de februaro oni memoras la *Pastron Salvador Varela*. Ĉi tiu elstara filo de Huerca Overa vivis dum la 19-a jarcento kaj li estis fama en la tuta provinco pro siaj piaj agadoj favore al malriĉuloj.

Manĝaĵoj

La klimato influas la riĉan gastronomion de Huerca Overa. Dum vintre oni kutimas prepari frititaj paneroj, kune kun paprika supo kaj fritiaj sekaj tomatoj. Ankaŭ oni devas elstari la fiŝojn kaj la vino.

Bongustaj estas stufaĵoj ellaboritaj kun tritiko, kukurboj kaj fenkoloj. Dum somere estas tipaj gazpaĉo kaj fritajoj de kuniko kaj kokido konataj kiel *gurullo*, bongustaj ankaŭ estas la pasto kun fiŝ-buljono.

Dum la kristnaskaj festoj ankoraŭ estas eble trovi familiojn kiuj renkontiĝas por ellabori proprajn kolbasojn kaj budenojn. Dum Kristnasko oni preparas ankaŭ bongustegajn dolĉaĵojn, kiel la torto kun trorostita viando, olea pano kaj la blankaj pasteĉoj ellaboritaj per migdaloj.

Andaluza

Kuirarto

AJOBLANCO

Kiam oni pripensas en la andaluza tipa manĝaĵo gazpaĉo oni pensas unuamomente en la tomato. Tamen estas necese memori, ke la tomato estas legomo venita de Ameriko kaj ke la gazpaĉo jam ekzistis antaŭ la eltrovo de tiu kontinento. Do, historie gazpaĉo estis kiu ajn malvarma supo kie la ajlo abundis, malmultekosta en ĝia preparado kaj kapabla nutri kamparanajn laboristojn.

Ĉi tiel difinita la gazpaĉo, almenaŭ el la historia vidpunkto, nun oni devas diri, ke ekzistas tra la tuta Andaluzio multaj malvarmaj supoj, la plejmulto el ili kun granda kvanto da tomatoj, kiuj povas esti nomataj gazpaĉo, unu el ili estas la ajoblanco au blanka gazpaĉo preparita laŭ la stilo de la andaluza provinco Jaeno.

Por prepari *ajoblanco* estas bezonata:

- 200 gramoj da blankaj krudaj migdaloj.
- 500 gramoj da pano.
- 4 ajleroj.
- Oleo.
- Vinagro
- Akvo (2 litroj)
- Salo
- Pomo aŭ sekaj vinberoj.



Jen la ellaborado:


Unu tagon antaŭ la ellaborado ni subakvigos la migdalojn ene de akvo. Kiam la migdaloj estos malmolaj oni aldonos oleon, vinagron, akvon, salon kaj panon.

Ni muelos la tutajn ĝis atingi paston, al kiu oni aldonos la tranĉitan pomon aŭ la sekajn vinberojn. Manĝi la *ajoblanco-n* tre malvarme. En kelkaj vilaĝoj oni anstataŭigas la migdalojn per sekaj faboj

Por prepari ĉi tiun manĝaĵon estos necese pli malpli 20 minutojn. La proponitaj ingredientoj estas sufiĉaj por proksimume 4 personoj. Kvankam oni povas manĝi *ajoblanco-n* dum la tuta jaro, kiel ĉiuj aliaj gazpaĉoj, estas tre konvena por somero.

Venontnumere ni turismos en**LINARES (Jaeno)**

Solvo al la pasint-numera krucvortenigmo:



Trovu 7 manĝaĵoj, jen ili: terpomo, pano, tomato, ovo, maizo, oranĝo kaj fromaĝo.

Per la ne-uzitaj literoj estas eble legi belegan zamenhofan strofon:

*La espero, la obstino kaj la pacienco, jen estas la signoj per kies potenco,
ni paŝo post paŝo post longa laboro atinans la celon en aloro*

Esperanto en Jaeno

15-a Andaluza Kongreso de Esperanto
30-a oktobro / 1-a novembro
2010



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La Hundo MORO

Se Vi iam vizitas la kordovan vilaĝon Fernan Nuñez, Vi povos vidi ĉe parko malgrandan monumenton omaĝe al hundo nomita *Moro*. Ofte, la agadoj de hundoj, sendube havantaj sesan senson, surprizas eĉ la proprajn mastrojn. Tiu estis la kazo de *Moro*, kiu surprizis la tutan vilaĝanaron.

Moro estis speciala hundo, ĝi apartenis al neniuj personoj, nur maljuna virino nomita *Carmela* dediĉis nutri ĝin, kiam ŝi vidis ĉi vagabondan hundon okaze de entombigo de familiano. Kaj tiu estis la eksterordinara senso de *Moro*, ĝi kapablis senti la baldaŭan morton de la personoj.



Monumento al hundo *Moro*
en Fernan Nuñez (Kordovo)



Verŝajne la sola ekzistanta
fotografajo de la hundo, kompreneble okaze
de reala entombigo

Ĉi tiu stranga sesa senso irigis ĝin ĉe la pordo de la hejmo de tiuj personoj kaj tie ĝi, paciencie, atendis, sed tio nur finiĝis kiam la persono forpasis kaj okazis la entombigo.

Pro tio, li estis timata hundo, la vilaĝanoj instigis ĝin forkuri kiam ĝi aperis tuj apud domo, eĉ dufoje oni prenis ĝin kaj, pere de kamiono, iu transportis ĝin je tre foraj urboj, konkrete al Granado (pli ol 130 kmoj) kaj al Reĝurbo (pli ol 160 kmoj), kaj ambaŭokaze, la hundo revenis en la vilaĝon. Kiel? Neniu scias.

Entute la hundo ĉeestis pli ol 600 entombigoj, ĝis kiam en la jaro 1983, grupo de junuloj, sendube ebriaj, mortigis ĝin per batado. Kelkaj jaroj poste, la loka urbodomo decidis omaĝi kaj memori tiun specialan hundon kaj tiel, oni starigis malgrandan monumenton.

Multe oni parolis pri la hundo, kaj ĉefe pri tiu stranga sesa senso. Iuj asertis, ke la besto iris tuj apud la personoj renkontiĝitaj okaze de entombigoj, pro la fakto, ke la hundo sciis, ke tie kie estis personoj abundis la manĝaĵoj; tamen aliaj respondis, ke ĝi neniam vizitis nuptojn aŭ baptajn festojn, kie la manĝado estas multe pli abunda.

Laŭdire, dum kelkaj jaroj la hundo havis mastron kaj li mortis. Oni diras, ke la hundo memoris la odoron de ĝia antikva mastro kiam ĝi estis apud gravega malsanulo kaj pro tio, li ĉiam restis tuj apud la hejmoj de tiuj personoj kiuj forpasis baldaŭe.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Ni metas je la dispono de la membroj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo jenajn verkojn eldonitaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

PLATERO KAJ MI



Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon. Tradukis Miguel Gutiérrez Adúriz.

Prezo: 8 eŭroj

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituis la restarigon de la pura tragedio sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio. Tradukis: Miguel Fernández

Prezo: 6 eŭroj

SANGA NUPTO



Internaciaj Esperanto-Asocioj

UNIVERSALA MEDICINA ESPERANTO-ASOCIO

Dum la 4-a Universala Kongreso de Esperanto en Dresde (Germanio) en la jaro 1908-a fondiĝis la faka Esperanto-asocio pri Medicino, unue sub la nomo *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio* kaj ekde la jaro 1961-a kun la nuntempa nomo *Universala Medicina Esperanto-Asocio*. La celo de la asocio estas disvastigi kaj apliki Esperanton en medicinaj rondoj, al ĝi rajtas aliĝi krom la kuracistoj ankaŭ dentkuracistoj, flegistoj, apotekistoj kaj aliaj medicinaj faklaboruloj.

La asocio organizas renkontiĝon kadre de la Universalaj Kongresoj, kvankam ĝi ankaŭ okazigas en ĉiu dua jaro internaciajn medicinistajn konferencojn ekde la jaro 1977-a. UMEA havas proksimume 350 membrojn, ĝi havas ankaŭ naciajn sekciojn en diversaj landoj. La asocio havas du kromajn sekciojn, unu pri veterinaraj aferoj kaj alia pri stomatologio.

UMEA eldonas 2-foje en la jaro la *Medicina Internacia Revuo*-n kaj ne-regule la *Medicina Kuriero*-n. Unu el la plej staraj agadoj de la medicina asocio estas la aljuĝo de la UMEA-Shinoda Premio. En la jaro 1973-a la japana samideano Hideo SHINODA donacis kapitalon por premii tiujn gesamideanojn prezentantaj proprajn medicinajn esploraĵojn publikigitaj en la internacia lingvo kaj rekonitaj de la Komitato de ĉi tiu premio kiel meritoplenan. La aŭtoroj de eseoj kiel *"Eksperimento kaj apliko pri injektaĵo weiligxiam"* aŭ *"Varicelo de infanoj kuracitaj per kortikosteroidoj kaj inmundsubpremantaj medikamentoj"* ricevis la premion



Alia grava agado de UMEA estis la fondiĝo en la jaro 1990-a en la urbo Krakovo (Pollando) de la Polikliniko UMEA-Shinoda Kuracejo, por plenumi tun projekton oni ricevis la monan helpon de la Shinoda Fondaĵo kaj de elstaraj membroj de la organizo, kiel la japana Doktoro Masayuji SAIONJI.

La nuntempa Prezidanto de la Medicina Asocio estas la hungara Doktoro Imre FERENCZY. Pliaj informoj pri la asocio troviĝas ĉe:

- http://www.uea.org/vikio/Universala_Medicina_Esperanto-Asocio

kaj de ĝia stomatologia sekcio ĉe:

- <http://ttt.esperanto.org/umea/odonto>



Forpasis en Kanado

HIGINIO GARCÍA

andaluza esperantisto

La pasintan 8-an de aprilo forpasis en Alma, Kebekio, Kanado, Higinio GARCÍA. Li naskiĝis en Antekero (Malago) en la jaro 1936. 16-jaraĝa li lernis la internacian lingvon kaj en la jaro 1963, kiam li estis 24-jaraĝa, li elmigris en Kebekion.

Laŭ lia amiko Michale LÉGARE ... *li kunportis en siajn bagaĝojn siajn vortarojn, gramatikojn kaj manlibrojn*

de esperanto. Li studis la latinan, la grekan, la hispanan lingvojn kaj filozofion. Kaj li poste intruis teologion, filozofion, la grekan kaj la hispanan lingvojn. Post sia emeritiĝo en la jaro 1997 li redaktis la franclingvan bultenon de Kanada Esperanto-Asocio.

Higinio GARCÍA kontribuis al la revuoj *ESPERANTO* kaj *MONATO*, kaj li verkis en la novelaro *Tempo Fuĝas* de 1995 kaj *Mondo* de 2001. Lia sola propra verkaĵo estis la novelaro *Kapturnoj* de la jaro 1999, laŭ Sten JOHANSSON temas pri *bukedo da rakontoj ĝuindaj, pensigaj, amuzaj kaj teruraj*. Eble lia lasta rakonto publikigita estis tiu aperinta sur *BELETRA ALMANAKO* n-ro 4-a (februaro 2009) sub la titolo *Rifuzita Memuaro* legebla ĉe <http://www.beletraalmanako.com/boao/ba4/ba4-gallery/index.html>

FLAMENKO

Deveno de la flamenka kanto kaj de la kastilia vorto "flamenco"

 Juan Arjona Leyva

Granda kvanto da homoj serĉadas la unuajn spurojn de la flamenka kanto. Oni devas retroiri al la dekkvina jarcento por trovi ilin: landlimaj kantoj arabaj/kristanaj luditaj de ambaŭflankaj junuloj celantaj amindumi junulinojn per tri-kvarversaj kantetoj.

Lingvistoj nomas "*harĉoj*" (hispane: *jarchas*) aŭ "*moaksahoj*" (hispane: *moaxajas*) la plej gravajn landlimajn kantojn. La plimulto el tiaj fakuloj tuŝas la amajn temojn, kaj tiel ĝuste nuntempe okaze de la flamenka kanto.

Nuntempe oni rakontas en *Villanueva de la Concepción*, vilaĝo en la malaga provinco, legendon neniam okazinta kompreneble, tamen meritoplena por ke oni akceptu ĝin kvazaŭvera pro ĝiaj beleco kaj romantikeco. Aldone, ĉar ĝi klarigas la devenon de la flamenko-fenomeno kaj de la termino difinanta ĝin.

Jen resume:

La nokto estis malvarmeta kaj ĉiuj homoj noktomanĝis la "hariron" kiel kutimas ĉe la islamaj hejmoj. La ombroj invadis la vestiblojn kaj tie, en unu el ili, viro projektis sian sveltan ombron sub la malforta



lumo de la nokta astro. Li estis ALI, unu el la plej milit-harditaj junuloj en la al-andalusa loĝloko. La loĝdomoj situis proksime de *Gŭadikso* (hispane: *Guadix*), flanke de la landlimo.

En la alia flanko la kristanoj dominis la vilaĝeton. De la lasta bataleto inter araboj kaj kristanoj jam pasis dek jaroj. La islamoj de Gŭadikso estis hortokulturistoj kaj ili ĝuadis amikajn rilatojn kun la kristanoj. La religiaj kaj kulturaj malsamoj tute ne gravis.

Ĉiuvespere Ali iris al la vilaĝo por vendi legomojn al la kristanoj loĝantaj tie. Post la vendado, preskaŭ ĉiam profita, li promenis ĝis la ĉirkaŭo de la vilaĝo por paroli kun sia amiko Guzmano (hispane: *Guzmán*), kristana knabo, kiu laboradis de sun-leviĝo ĝis sun-subiro en la kampoj de sia maljuna patro.

Guzmano estis enamiĝanta al la fratino de sia amiko. La fratino ankaŭ amis lin, tamen sia patro preskaŭ enŝlosis ŝin malhelpante la amajn kontaktojn. Guzmano ege prizorgis la amikecon de Ali. Ĉi tiu estis kvazaŭ unika pas-permeso por paroli kun ŝi kiam malofte, li akompanis ŝian fraton okaze de la fruktovendado.



La peniga laboro perplugila kaj la malglateco de la grundo fariĝis al li facilaj kaj mallongaj kiam li esperis vidi ŝin vespere. Tamen, malbonŝance la patro konis la aferon kaj ordonis sian filinon loĝi kun ties geonkloj loĝantaj en Zaharo (hispane: *Zahara*) kaj promesante ke ŝi neniam reiru al Gŭadikso.

Tiel afliktiĝis la junulo, ke li supozis frenezigi. De la horto oni aŭdis liajn ĝemojn dum unu horo. Poste ĉio silentiĝis. Post tempeto, belega voĉo ekkantis la plej malgajajn harĉojn aŭdintaj tie. Jen arablingve la teksto:

*Aj habiba al yamiila,
Aalbii mankussiru
Tadhabiina baiidu
Maendiŝi qalbj*

*Kial vi foriris tiel longe?
Mi troviĝas senkore.*

De la horto oni aŭdis tion longtempe, la kanto ripetiĝis angore. La nokto kovris per funebra mantelo la tristajn sonojn de la rompita amanto.

La postan matenon la islamanoj demandis sin reciproke kiu estis la kantanto. *Fehláh mankus' ghan'na* (malgaja kamparano kantas, flamenke kantas) aliaj respondis surprize ĉar iu malgaja kantis. Eble tiel naskiĝis la flamenka kanto kaj la vorto "flamenko". Trista aŭguro difininta la andaluzajn homojn tiel harditaj, ke ili kuraĝiĝas okaze de la malfeliĉoj, Kelkfoje la paco brutigas kaj burĝigas nin.

Noto de la redaktoro: La aŭtoro de la artikolo petis nin aperigi ĝin akaŭ verkita en la andaluza parolmaniero, peto plenumota de la revuo sur ĉi tiu numero mem. Kvankam ne temas pri lingvo ekzistas kelkaj grupoj defendantaj la aŭtonomecon de la andaluza lingvo/parolmaniero. Oni devasi diri ankaŭ, ke ankoraŭ ne ekzistas aprobita normigo rilate la skribadon de la andaluza lingvo/parolmaniero. Do, la jena teksto reale baziĝas sur la prononcado ĉe la malaga provinco.

Muxa ente aj k'ehtá ehtudjando loh prenzipjoh der kante flamenko. Aj ke remontarze a loh kanteh de frontera árabe-krihtjana en er ziglo kinze en ke loh muxaxoh de ka lao l'exaban loh tejhoh a lah niñah kon kanzjoziyah de treh o kwatro berzoh.

Loh entendíoh en Lingwihtika yaman jharxah o moajhaxah a loh prenzipaleh kanteh de la frontera. Kazi toh jhweron de temah amorozoh, máh o menoh tar como okurre en er flamenko.

En ehtoh tjempoh ze kwenta en Biyanweba de la Konzerzjón una leyenda romántika ke anke n'aya okurrío nunka, merezía k'jhvera pazao poh lo bonita ke éh.

Tamjén pork'ehprika komo'mprizipjó er kante j la palabra flamenko.

" La noxe'htaba frehkiya j yabian zenaŭ la jharira ke eh kohtumbre zenahla en ka ogáh muzurmán. Lah zombrah imbahían loh portaleh j en uno d'eyoh un ombre proyertaba zu ehbarta zombra bajho la debih luh de l'ahtro de la noxe. Era Alí, uno de loh máh agherríoh muxaxoh der poblao andalusí. Ehtaban lah kazah mah o menoh zerka de Gwadíh, a un lao de la frontera j al'otro lao loh krihtjanoh dominaban er pwehlo. Abían pazao ya kazi djeh añoh ehde la úrtima refrjega entre moroh j krihtjanoh.

Loh muzurmaneh de Gwadíh eran gwertanoh j dihfrutaban de un trato amihtozo por parte de loh bezinoh der lugáh zin ke lah diferenzjah de kurturaj relijhjón no reprezentaran er menóh ohtákulo entre eyoh. Alí ze dirjihía to lah tardeh a

la plaza der pweblo j bendía tomateh j demáh ortalizah a loh krihtjanoh ke bibían en er pwehlo.

Andihpwéh de bendehe to, ze daba una gwerteziya pa xahlah kon un xiko krihtjano , ijho d'uno de zuh prinzipaleh kljenteh. Ze yamaba Guhmán j, komo gwena perzona ke era trabaaba de zóh a zóh en lah tjerrah de zu pae, k'era ya bjeezito.

Ehtaba Guhmán prendaíto, prendaíto de la'rmana de zu amigo. La muxaxa tamjén lo kería, pero zu padre la mantenía kazi enzerrá pa ke no bjera ar krihtjano. Guhmán kudjaba l'amihtá d'Alí kom'oro en paño. Pa éh era kom'un zarbokonduhto k'argunah bezeh l'abía zerbío pa kruzáh kwatro palabrah kon ella, kwando ehporajkamente akompañaba a zu'rmano a la benta d'ortalizah.

Er duro trabao de ara j dehmonte de zuh nwebah tjerrah ze le gorbía fazih j korto kwando tenía ehperanza de behla pohla tarde. Zin embargo kizo zu mala zwete ker padre d'Ali ze enterara j mandara a zu niña a bibih kon unoh tíoh ke tenía en Zahara, kon la promeza de ke amáh gorbería a Gwadíh.

Fwe táh er dehkonzwelo der muxaxo ke le parezjó enlokezéh. Ehde la gwerta z'rehkuxaban zuh shiyíoh durante máh d'una ora. Lwego er zilenzjo. Arrato una ermoza boh komenzó a entonah una de lah máh trihteh jharxah ke ze jhweran ehkuxao en akéh lugáh. La jharxa dezía azina:

*Aj 'habiba yamila
Ana qalbani mankus
Anti tadjab bai'du
Al'ana la' Aendi qalb.
Aj mi ermoza nobja
Tengo roto er korazón
Tú t'ah ío lejho
Ya no tengo korazón.*

Ehde la gwerta lo'htubjeron ehkuxando largo rato. La noxe kubrjó kon zu fúnebre manto loh zoneh de l'amante dehtrozao. A la mañana zighjente loh muzmaneh ze preguntaban unoh a otroh zi zabían kjen era er ke kantaba. - Fehláh mankus gan'a. (Un agrikurtóh dehtrozao kantaba), dezíanargunh ehprezando zu ehtrañeza de ke kantara kjen tenía una dehgrazja. Azi nazjó er flamenko j tamjén keó ihmentá la palabra "flamenko" . Trihte ugurjo ehte orákulo d'akéh ke muh definjó a loh andaluzeh komo ombreh kon tar temple ke ze krezen en lah dehgrazjah. La páh, argunah bezeh, muh embruteze j muh aburgheza.

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.

Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López

Sekretario: Julio Herrero Segura

Kasistino: María Dolores Torres Mateo

Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net



Ĉi tiel festis Google, la pasintan 15an de decembro, la 150-an datrevenon de la naskiĝo de L.L.Zamenhof, la aŭtoro de esperanto.